The decision of the New York Port Authority to build a bridge across the Hudson, to connect New York with the mainland at the highest point of the Palisades, which is Fort Lee, was destined to put this community on the map again and once for all. Owing to historical events, when during the retreat of the American Army in the Revolutionary War, Washington made his headquarters in Fort Lee (on the very spot where the central office of this association is now located) the name of this new bridge is the George Washington Memorial Bridge.

This bridge is the longest span in the world and it is a true gate-way to the great continent to the West with New York City and Long Island as the starting plaza. And Fort Lee is truly a gate-way and crossing. Here the direct road from Montreal to Washington passes through this town. The U. S. Route No. 1, starting at New Brunswick and going to the Florida Keys passes through here. And the Lincoln Highway from New York to San Francisco has its start a short distance from here. And it is no exaggeration when we state that the straight route from the Hollywood of the East to the Hollywood of the West starts at Fort Lee. We have thus one straight road from the central office of the Esperanto Association of North America to the city of our 25th anniversary congress in Los Angeles, Cal.

"As Lewis H. Maury, president of the New York Esperanto Society, once stated, 'the opening of the world's longest span between New York and Fort Lee, the George Washington Memorial Bridge on October 24, is not only the beginning of the gate-way to our vast continent but is also, and very truly so, the gate-way to the Esperanto movement in North America.'

"And so shall we also add our bit to put Fort Lee on the map with the aid of Esperanto."

—From the *Fort Lee Sentinel* of Oct. 24.

## Spertulara Kunvenejo

Interesa al mi estas la sekva frazo de paĝo 142 de Oficiala Gazeto Esperantista, 25 Oktobro, 1919:

"Laŭ la propono de tiu Komitato, la Dua Kongreso (Genevo 1906) decidis la kreon de Konstanta Komitato de Kongresoj, komisiita prepari la sekvantan Kongreson, aldonante al si, ĉiujfoje."

Kiel vi klarigas la gramatikan uzon, de la vorto 'aldonante? Kial la raportisto ne diris 'aldonanta' same kiel 'komisiita'? Kiam oni vidas la ad-verban partupon, oni serĉas por la subjekto de la "jus antaŭa verbo, kaj la subjekto sajnas esti la frazo "kreon de Konstanta Komitato de la Kongresoj komisiita," kaj la verbo la infinitivo 'prepari.' Malofte en Esperanto oni vidas tian konstruon, kaj estas interese ke la subjekto de infinitivo estas efektive akuzativa kaj servas ankaŭ kiel objekto de alia verbo. G. W. L.

## Kion Vi Diras?

Mi dankas por \_\_\_\_\_  
aŭ

Mi dankas pro \_\_\_\_\_

Ni donacos unu ekzempleron de "Lando de Argenta Akvo" por la plej bona respondo.

## EN PARIZO!

aperas

## Oomoto Internacia

monata ilustrita organo de

## Universala Homamo Asocio (U. H. A.)

riĉenhava, interesplena kaj bonstila ĵurnalo,  
redaktata en la Esperanto-spirito de  
Doktoro L. L. Zamenhof.

Jarabono por Usono \$1.00 kun senpaga  
U. H. A.—Membrokarto.

Petu Senpagan Specimenon!

Abonu ĉe

S-RO KOOGECU NIŜIMURA (japano)

1, RUE FELIX-FAURE

PARIS 15e.

## La Translokita Fantomo

De FRANK R. STOCKTON

*Tradukita de EDWARD S. PAYSON*  
Honora Prezidanto de la Esperanta Asocio  
de Norda Ameriko

*Fino*

Je tiu vespero mi sidis kun Madelino sur la lunluma portiko. Estis preskaŭ la deka horo kaj de kiam ni vespermanĝis mi estis kuraĝiginta min por konfesi miajn sentojn. Mi ne tute decidis fari ĉi tion, sed mi deziris laŭgrade atingi la decan staton kiam, se la cirkonstancoj ŝajnus favoraj, eble mi parolus. Mia kunulino ŝajne komprenis la situacion—almenaŭ mi imagis, ke ju pli proksimen mi alvenis al ampropono, des pli ŝi ŝajnis atendi ĝin. Estis certe tre gravega epoko en mia vivo. Se mi parolus, mi farus min feliĉa aŭ malfeliĉa por ĉiam; kaj se mi ne parolus mi havis ĉian kialon kredi, ke la fraŭlino nepre ne donus al mi okazon refari tion.

Tiel sidante kun Madelino, iomete babilante, kaj multe pensante pri ĉi tiuj gravegaj aferoj, mi suprenrigardis kaj vidis la fantomon proksimume dek du futojn for de mi. Li estis sidante sur la palisaro de la portiko, kun unu kruro supren tirata, la alia pendanta malsupren, dum li sin apogis kontraŭ stango. Li estis malantaŭ Madelino, sed preskaŭ antaŭ mi, kiam mi sidis kontraŭ la fraŭlino. Estis bonŝance, ke Madelino estis rigardanta trans la pejzaĝon, ĉar mi nepre ŝajnis tre surprizata. La fantomo estis dirinta al mi, ke li parolos al mi iam dum la venonta nokto, sed mi ne opiniis, ke li aperos kiam mi estas kun Madelino. Si ŝi vidus la fantomon de sia onklo, mi ne povus respondi por la konsekvencoj. Mi ne ekkriis, sed la fantomo evidente vidis, ke mi estas ĝenata.

“Ne timu,” li diris—“mi ne permesas, ke ŝi vidu min; kaj ŝi ne povas aŭdi min se mi ne alparolas al ŝi, tion mi ne intencas fari.”

Mi supozas, ke mi aspektis dankema.

“Tial vi ne bezonas ĝeni vin pri tio,” la fantomo diris;“ sed ŝajnas al mi, ke vi ne progresas tre bone pri via afero. Se mi estus vi, mi parolus malkaŝe ne atendante pli longe. Neniam vi havos pli bonan okazon. Ne estas kredeble, ke vi estos interrompata; kaj, laŭ mia opinio, la fraŭlino inklinas aŭskulti al vi favore; tio estas, se ŝi iam intencas fari tion. Neniu povas scii kiam denove forveturos Johano Hinckman; certe ne dum ĉi tiu somero. Se mi estus en via loko, mi neniam havus la kuraĝon amindumi la nevinon de Johano Hinckman se li estus kie ajn apud la loĝejo. Se li kaptus iun proponanta edziĝon al fraŭlino Madelino, li fariĝus terura viro por renkonti.”

Mi konsentis kun li perfekte pri ĉio tio ĉi.

“Mi ne povas elporti pensadon pri li,” mi diris aŭdeble.

“Pensi pri kiu?” demandis Madelino, sin turnante rapide al mi.

Jen estis embarasa situacio. La longa paralado de la fantomo, al kiu Madelino ne atentis, sed kiun mi aŭdis kun perfekta klareco, kaŭzis ke mi forgesis min.

Estis necese klarigi rapide. Kompreneble, ne decus, ke mi parolis pri ŝia kara onklo, kaj do mi citis rapide la unuan nomon pri kiu mi ekpensis.

“Sinjoro Vilaro,” mi diris.

Ĉi tiu diraĵo estis tute prava; ĉar mi tre malŝatis pensi pri sinjoro Vilaro, kiu diversfoje estis treege atenta al Madelino.

“Estas malprave paroli tiamaniere pri sinjoro Vilaro,” ŝi diris. “Li estas rimarkinde bone edukita kaj prudenta juna viro kaj bonmaniera. Li atendas esti elektata al la parlamento la venontan aŭtunon, kaj ne surprizus min se li trafus. Li sukcesos en parlamento ĉar kiam ajn sinjoro Vilaro havas ion por diri li scias ĝuste kiamaniere kaj kiam diri ĝin.”

Ĉi tio estis dirata tre trankvile, kaj sen ia evidenco de indigno, kiu estis tute natura, ĉar se Madelino sentus iel favore al mi ŝi ne povus esti malkontenta ĉar mi havis malagrablajn emociojn pri kredebla konkuranto. La finaj vortoj enhavis aludeton kiun mi ne malrapide komprenis. Mi sentis tre certa, ke se sinjoro Vilaro estus en mia nuna situacio li parolus sufiĉe rapide.

“Mi scias, ke estas malprava havi tiajn ideojn pri persono,” mi diris, “sed mi ne povas malhelpi tion.”

La fraŭlino ne riproĉis min, kaj post tio eĉ ŝajnis esti en pli dolĉa humoro. Mi mem sentis iomete maltrankvila, ĉar mi ne volis konfesi, ke ia penso pri sinjoro Vilaro iam okupis mian cerbon.

“Vi devus ne paroli aŭdeble tiamaniere,” diris la fantomo, “aŭ eble vi trovos vin en embaraso. Mi deziras vidi ĉion prosperi ĉe vi, ĉar tial vi estos inklinata helpi min, speciale se mi okaze povus iel helpi al vi, kiel mi esperas.”

Mi tre deziris diri al li, ke estas nenia metodo per kiu li povus helpi min tiom, kiom per lia tuja foriro. Amindumi junan fraŭlinon kun fantomo sidanta sur la palisaro apude, fantomo kiu estas la similaĝo de multe timata onklo, eĉ pensi pri kiu en tia situacio kaj je tia tempo faris min tremi, estis malfacile, se ne neeble; sed mi ne permesis min paroli, kvankam mia vizaĝo esprimis mian penson.

“Mi supozas,” daŭrigis la fantomo, “ke vi aŭdis nenion, kio eble utilas al mi? Kompreneble, mi estas avida scii pri ĝi; sed se vi havas ion por diri, mi povas atendi ĝis kiam vi estas sola. Mi venos al via ĉambro hodiaŭ nokte, aŭ mi restos ĉi tie ĝis kiam la fraŭlino foriros.”

“Vi ne devas resti ĉi tie,” mi diris, “mi havas tute nenion por diri al vi.” Madelino ekstaris, kun vizaĝo ekrugiĝanta kaj ŝiaj okuloj flamiĝantaj.

“Resti ĉi tie!” ekkriis ŝi. “Por kio vi supozas, ke mi estas atendanta? Nenion por diri al mi! ja! —kompreneble! kion vi povus havi por diri al mi?”

“Madelino,” mi ekkriis, ekiranta al ŝi, “permesu al mi klarigi.”

Sed ŝi estis foririnta.

Jen estis la fino de la mondo por mi! Mi turniĝis furioze al la fantomo. “Malaminda ekzistajo!” mi ekkriis. “Vi ruinigis ĉion. Vi nigrigis mian tutan vivon. Se ne estis pro vi . . .” Sed tiam mia voĉo ŝanceliĝis. Mi ne povis diri plu.

“Vi estas maljusta al mi,” diris la fantomo. “Mi ne malutilis al vi. Mi penis nur kuraĝigi kaj helpi vin, kaj via propra malprudento faris ĉi tiun malbonaĵon. Sed ne malesperu. Tiaj eraroj nepre devas esti klarigotaj. Restu kuraĝa. Adiaŭ.”

Kaj li malaperis for de la paliso simile al eksplodanta sapveziko.

Malĝoje mi enlitiĝis, sed tiun nokton mi vidis nenian aperaĵon krom tiuj de mizero kaj malespero kiujn miaj malgajaj pensoj elvokis. La vortoj kiujn mi eldiris sonis al Madelino kiel nepardon-ebla insulto. Kompreneble, estis nur unu signifo kiun ŝi povus ricevi de ili. Ke mi penu klarigi miajn diraĵojn ja estus neeble. Mi pripensis la aferon foje kaj ree dum mi sendorme kuŝis tiun nokton, kaj mi decidis neniam diri al Madelino la faktojn pri la okazintaĵo. Estus pli bone, ke mi suferu dum mia tuta vivo ol, ke ŝi sciu, ke la fantomo de ŝia onklo vizitadas la domon. Sinjoro Hinckman estis for, kaj se ŝi scius pri la fantomo, ŝi ne povus kredi, ke ŝia onklo ne estas mortinta. Eble ŝi ne povus travivi la novaĵon. Ne, mia koro elverŝu sian sangon sed mi neniam sciigos ŝin.

La sekvinta tago estis bela, nek tro malvarmeta, nek tro varma; la ventoj estis mildaj kaj naturo ridetis. Sed estis nek promenoj, nek veturoj por mi kun Madelino. Ŝi ŝajnis esti treege okupata dum la tago, kaj mi ne multe vidis ŝin. Kiam ni renkontiĝis ĉe manĝoj ŝi estis tre ĝentila, sed tre trankvila kaj sindetema. Evidente ŝi decidis pri sia konduto, kaj ankaŭ decidis ŝajnigi ke, kvankam mi estis estinta tre malĝentila al ŝi, ŝi ne komprenis la signifon de miaj vortoj. Estus tute deca, kompreneble, ke ŝi ne komprenu tion, kion mi intencis per miaj esprimoj de la antaŭa nokto.

Mi estis malgaja kaj mizera, mi diris nur malmulte, kaj la sola gaja strio trans la nigra horizonto de mia malĝojo estis la fakto, ke ŝi ne ŝajnis esti feliĉa, kvankam ŝi penis ŝajni indiferenta. La lunluma portiko estis forlasita tiun vesperon, sed

kiam mi vagadis tra la domo mi trovis Madelinon sola en la librejo. Ŝi estis leganta, sed mi eniris kaj sidiĝis apud ŝi. Mi sentis, ke mi devos iomete klarigi al ŝi pri mia konduto de la antaŭa vespero, kvankam mi ne povis fari tion entute. Trankvile ŝi aŭskultis al mia iom malelokventa pardonpeto, kiun mi faris al ŝi pri la vortoj kiujn mi estis uzinta.

“Mi havas nenian ideon kion vi intencis,” ŝi diris. “Sed vi estis tre malĝentila.”

Mi serioze malkonfesis ĉian intencon esti malĝentila, kaj certigis al ŝi, kun varmeco de parolado kiu nepre faris iom da efekto al ŝi, ke malĝentileco estus ago nebla. Mi diris multe pri la afero, kaj petegis, ke ŝi kredis, ke, kun la escepto de unu baro, mi povus alparoli al ŝi tiel klare por ke ŝi komprenu ĉion. Ŝi restis silenta dum momento, tiam ŝi diris, iom pli afable, laŭ mia opinio, ol ŝi antaŭe parolis:

“Ĉu tiu baro iel rilatas al mia onklo?”

“Jes,” mi respondis post iom da hezito. “Laŭ ia maniero, ĝi rilatas al li.” Al tio ŝi ne respondis, kaj sidis rigardante sian libron, sed ne leganta. Laŭ la esprimo de ŝia vizaĝo mi opiniis, ke ŝi estas pli favora al mi. Ŝi konis sian onklon tiel bone, kiel mi, kaj eble ŝi estis pensanta, ke, se li estus la baro kiu malhelpis mian paroladon, (kaj estis diversaj manieroj laŭ kiuj li povus esti tiu baro,) mia situacio estis tiel malfacila, ke ĝi pardonigos iom da senenca parolado kaj stranga maniero. Mi vidis, ankaŭ, ke la varmeco de miaj partaj klarigoj faris iom da efekto al ŝi, kaj mi komencis kredi, ke eble estus bone senprokraste diri tion, kion mi sentas. Kiel ajn ŝi ricevos mian proponon, miaj interrilatoj kun ŝi ne povus esti pli malbonaj ol ili estis dum la antaŭa tago kaj nokto, kaj en ŝia vizaĝo estis io, kio kuraĝigis min esperi, ke eble ŝi forgesus miajn malsaĝajn vortojn de la antaŭa vespero se mi komencus diri al ŝi mian rakonton pri amo.

Mi tiris mian seĝon pli proksimen de ŝi, kaj ĵus kiam mi tion faris, la fantomo ekkuris en la ĉamburon tra la pordkrado malantaŭ ŝi. Mi diras ‘ek-kuris’ kvankam nenia pordo estis malfermita kaj li faris nenian bruon. Li estis furioze ekscitita kaj ŝvingis la brakojn super sia kapo. Tuj, kiam mi lin vidis, mi tute malesperis. Kun la eniro de tiu impertinenta fantomo, ĉiu espero forlasis min. Mi ne povis paroli dum li estis en la ĉambro.

Mi sendube paliĝis; kaj mi fikse rigardis la fantomon, preskaŭ ne vidante Madelinon, kiu sidis inter ni.

“Ĉu vi scias?” li ekkriis, “ke Johano Hinckman estas supren venanta la monteton? Li estos ĉi tie post proksimume dek kvin minutoj; kaj se vi estas iel amindumanta vi devus rapidigi tion. Sed mi ne venis por diri al vi nur tion. Mi havas gloran novaĵon! Fine mi estas translokita!



Antaŭ malpli multe ol kvar dek minutoj, rusa nobelo estis mortigita de la Nihilistoj. Neniu iam pensis pri li rilate al tuja fantomeco. Miaj amikoj senprokraste pro-petis por la situacio, kaj por *mi*, kaj efektivigis mian translokiĝon. Mi foriros antaŭ ol tiu malagrabra Hinckman supren venos la monteton. Tuj kiam mi atingos mian novan situacion mi demetos ĉi tiun malamatan similecon. Adiaŭ. Vi ne povas imagi kiom ĝoja mi estas, ke mi fine fariĝas ies reala fantomo."

"Ho," mi ekkriis, ekstarante, kaj etendante miajn brakojn pro mia mizerego. "Se la ĉielo nur permesus, ke vi estu mia propra!"

"Mi ja estas via propra," diris Madelino, direktante al mi siajn larmemajn okulojn.

(Fino.)

## Stelplena Standardo

De H. I. KEYES

(THE STAR SPANGLED BANNER)

*Ho, vidas en lumo matena, ĉu vi?—  
La standardon viditan bieraŭ vespere?  
Kies strioj kaj steloj sin montris al ni  
Kiam sur la remparoj ĝi flirtis fiere?  
Je boro post boro, rigardis ni por  
Konstati ke oni ne kaptis ĝin for!  
Stelplena standardo, ho long-flirtu vi  
En la lando libera—la bejmo por ni!*

—From the coming "American Esperanto Song Book."

## Rotary International Service Committee Chooses Esperanto

"Will our children be wise enough to have an auxiliary language for such international gatherings so that *all* may understand *all* that is said?" This was the question of Sydney W. Pascall, the new President of Rotary, in referring to the international conventions of Rotary where the language difficulty has made itself felt. The International Service Committee, which was commissioned to investigate the relative values of the various auxiliary languages, has, according to numerous rumors which have reached us from different points, selected Esperanto as the most suitable for the purpose. It seems to us that now that Rotary has selected *the* language, the next thing to do is to *use* it, and thereby answer the president's question. We hope that the Rotarians will not wait for their *children to be wise enough*, but will prove their own sagacity by using Esperanto.

## Rotari' Ho Rotari'

(English words by Rotarian Herbert H. Stalker, Toledo, Ohio. Esperanto translation by Rotarian J. D. Applebaum, Liverpool, England.)

Mi amas laŭdi vin per kant' Rotari', ho Rotari'!  
Al vi mi estas ĵur-portant'. Rotari', ho Rotari'!  
Tra am', fidel', sur gaja ond',  
Mi servos al fratar' de l'mond',  
Kaj kara restu leg' de l'rond' Rotari' ho Rotari'!

Do kantu nun en alta skal'  
Gi sonu trans la mont' kaj val'  
La celo estu ver', honor',  
Fariĝu puraj viv' kaj kor',  
Dum kantas ni en monda ĥor'

Rotari', ho Rotari'!

*Melodio estas de la Germana popolokanto  
O Tannenbaum.*

## Echoes From Readers

"— —. Tiu lasta numero de Amerika Esperantisto estas mirinde bela; mi ne diras ke ĝi estas la plej bona Esperanta gazeto en la mondo, sed ĝi certe havas la plej allogan belan kovrilon de la tuta Esperanto-gazetaro, kaj ĉar alloga prezentado estas kiel por ĉia komercaĵo duono de la vendado, ĝi multe promesas, ĉar la enhavo mem dependas de la laboro de la usonaj Esperantistoj."—CHARLES CHOMETTE.

"Ni ĉiuj gratulas vin pro la plibonigita kaj respektenda gazeto."—A. DEVOE.

"— — permesu ke ni sincere gratulu vin por via klopodado vekigi la movadon en Usono kaj havigi al la usonaj esperantistoj belan revuon."—HANS JAKOB, Direktoro de U. E. A.

Be sure to have your name in the Almanac of 1932; renew your membership NOW!

## New Books : Novaj Libroj

*Baha'u'llah kaj la Nova Epoko*, de D-ro J. E. Esslemont, tradukita el la angla lingvo de Lidja Zamenhof. Eldonejo "Nova Tago," Weinheim, Germanujo, 191 paĝoj, prezo \$1.25. Tiu ĉi libro detale pritraktas la historion, profetaĵojn kaj instruojn de la Bahaa religio kaj movado; ĝi rakontas pri la persekutoj de la unuaj Bahaanoj en Persujo kaj Turkujo, kiel oni enkarcerigis ilin kaj kiel ilia anaro kreskis spite al ĉiuj kontraŭagoj de la mahometanaj registaroj. Ĝi priskribas kaj klarigas la instruojn de Baha'u'llah kaj Abdul Baha, kiuj estis verkitaj faskope, jen en araba lingvo, jen en plej klasika persa lingvo, malgraŭ nenia literatura edukiteco flanke de la Malkaŝantoj.

Interesa kaj signifoplena estas la fakto ke Baha'u'llah klare kaj precize profetis antaŭ 65 jaroj la egalrajtecon de viroj kaj virinoj, la Mondmiliton, la socialajn malfacilaĵojn post la milito, la kreiĝon de ligo de nacioj, la starigon de internacia arbitracia juĝantaro, kaj la ĝeneralan uzadon de internacia helplingvo. Per studado de la libro oni konvinkigis pri la grandega amplekso de la Bahaa instruoj, kaj ilia granda valoro kiel gvidiloj en nia persona, socia, ekonomia, kaj internacia vivo. La Bahaa religio celas la forigon de ĉiuj-specaj antaŭjuĝoj, akordiĝon inter religio kaj scienco, sendependan esploron de la vero, kaj antaŭ ĉio la unueciĝon de la homaro ekonomie same kiel religie, nacie kaj rase. Anstataŭ akcenti la diferencojn inter la diversaj religioj, ĝi atentigas ke la fundamento de ĉiuj religioj estas unu, kaj ke la instruoj de la religioj similas unuj la aliajn. Ĝi forprenas la unikecon de Kristo, kaj kategorias lin kiel unu el kelkaj "Malkaŝantoj de la Vero," kune kun ĉiuj aliaj profetoj kiel Kriŝna, Zoroastro, Moseo, Mahometo kaj Baha'u'llah, unu el kiuj aperis post ĉiuj kelkcent-jaroj kaj trans-donis revelaciojn al la homaro tiam kiam ĝi estis disvolviginta sufiĉe por komenci pluan ŝtupon de progresado. La nuna ŝtupo estas lumigata per la instruoj de Baha'u'llah, kaj estas kredeble ke ĉiuj religioj povus sin multe riĉigi se ili renovigus siajn kredarojn por enteni la instruaron de tiu lasta "Malkaŝanto," kiu celas la unueciĝon de la homaro. Ĉiu klera, progresema verserĉanto devus senpartie trastudi kaj esplori la instruojn de tiu ĉi ĉionampleksanta movado kiuj estas plaĉe kaj bele klarigitaj en ĉi tiu libro.

La traduko estas bona, kaj estas nur kelkaj esprimoj kiuj iom ĝenas; ekzemple:—destinis por li la postenon de *kapo* de la Movado. (estro); glorakto (glorago); Refoje li denove ripetis; faktorioj (fabrikejoj); furio (furiozo). Preseraroj preskaŭ mankas, kaj la preso kaj papero estas bonaj.

A. F. DONEIS.

*La Vojo Returne*, de Erich Maria Remarque, tradukita de Joseph Berger, eldonita de Heroldo de Esperanto. Prezo \$2.50 bindite. 370 paĝoj.

En Okcidento Nenio Nova havis unikan sukceson, kaj estas nenia dubo ke la dua libro atingos similan sukceson. Tiuj ĉi du libroj kompletigas unu la alian kaj la dua atestas la verecon de la unua al tiuj kiuj ne travivis la militon ĉefronte. En "La Vojo Returne" Remarque majstre kaj laŭ sia malkomplika maniero pentras la animstaton de la front-soldatoj kiam ili revenis el inter morto, neniigo, kaj buĉado. Kia neatendita malpleneco post la armistico! Kiaj frakasitaj revoj post la reveno; kiaj seniluziigoj pri la paca vivado, pri la gekaruloj, pri la patrujo, pri la tuta socia vivo. Ĉu neniuj komprenas ilin? Kiom da soleco ili sperdas, kiom ili penegas por ekinteresiĝi pri tiu ĉi ŝajn-paca vivado! Kiom da vanaj klopodoj ili faras por religi sin al la mondo de vivo. Per majstra peniko Remarque pentras la insidantajn terurfantomojn kiuj ne estas forigeblaj el la fundo de iliaj mensoj. Kiel la speguliĝoj de teruro kaj timego sin hurlas tra iliaj mensoj. Majstre Remarque priskribas ĉiujn nuancojn de la emocioj, kaj pensiga estas la priskriboj de iliaj fiaskadoj kaj pereigo dum la alikutimiĝado al la nova vivo.

La traduko estas same bona kiel "En Okcidento nenio Nova" kaj tiu ĉi libro ankaŭ havas komentaron por klarigo de diversaj esprimoj kaj nekutimaj vortoj. La vorto "kutavajo" kiel ekvivalento de "cutaway" ĝenadas anglalingvanojn, kaj estus dezirinde trovi pli bonan esprimon aŭ pli korektan ortografio de la vorto.

Sendube ĉiuj volos legi tiun ĉi majstroverkon, kaj ne volos formeti ĝin antaŭ ol ili estos finleginte ĝin.

A. F. D.

### Baha' U'llah Kaj La Nova Epoko

By Dr. J. E. Esslemont

(BAHA'U'LLAH and the NEW ERA)

A splendid translation made by Miss Lidja Zamenhof, the daughter of the inventor of Esperanto.

This book gives an authoritative and comprehensive survey of Baha'i history and teachings as related to present religion, scientific and social conditions in Europe and America.

The Baha'i Publishing Committee will be very glad to fill orders. Price, \$1.50.

BAHA'I PUBLISHING COMMITTEE  
P. O. Box 348, Grand Central Station  
New York City

## Cseh-Method in New York

*New York, N. Y.* The first public trial lesson of the Cseh-Courses in America was conducted by Prof. Jens Schjerve in the crowded hall of the Holland Hotel, in New York, on Thursday, November 12th. The course was opened by Mr. J. J. Sussmuth, General Secretary of E. A. N. A., who in a short address stimulated the audience's interest in Esperanto, and urged the participants to become leaders and pioneers, instead of following the crowd. After being introduced by Mr. Sussmuth, Prof. Schjerve began to "smuggle" a knowledge of Esperanto into his listeners by way of an interesting and entertaining conversation in Esperanto. In the audience there were a large number of old Esperantists from the New York Esperanto Society, the Esperanto Club "Harmonio," the "S. A. T." and Labor-groups, who marveled at the simplicity and effectiveness of the method, and at the fact that these "nove-bakotaj Esperantistoj" could, by the Cseh-method, master in a few hours that which ordinarily required many hours of tiresome drill. One of the guests of honor was Dr. Gunnar Horn, discoverer of the remains of the Andree Arctic Expedition. (See "Per Balono al Poluso," obtainable at E. A. N. A.) Many of those present signed up for the course, among them many old Esperantists who wish to become acquainted with the method.

*New York Metropolitan Area.* A number of sample lessons of the Cseh course were given in various parts of the metropolitan area, and among the larger ones were those at the Bahai Assembly in West Englewood, N. J., and at the meeting of the All Nations' Association, which was attended by several hundred cosmopolitans. All of these people were much impressed and it was expected that many of them would partake in the course which was to start Tuesday, November 17th.

## IALA

International Auxiliary Language  
Ass'n in the U. S., Inc.

Box 118, 525 West 120th St., New York

A Neutral organization for the disinterested study of problems involved in the establishment of a constructed IAL

RESEARCH  
INFORMATION AND SALES SERVICE

## Echoes From Our Readers

May I take this opportunity of complimenting you again on the splendid format and "enhavo" of your really excellent publication?—A. H. ROGERS.

The American Esperantist, Vol. 44, No. 1, is a splendid edition. Better every time.—Prof. WILLIAM J. H. KNAPPE.

La gazeto multe pliboniĝis. Miajn gratulojn al la estraro.—HYMAN LEDEEN.

Heartiest congratulations on the splendid September-October issue just received. I am familiar with every copy of A. E. since Vol. 1, No. 1, and, without exaggeration, allow me to say that this is the best yet. You deserve the thanks of every Esperantist in Usono.—Mrs. ISABELLE M. HORN.

I have been very much delighted with the A. E., especially the September-October number. It is indeed a very creditable issue.—Prof. ELVEN J. BENGOUGH.

La lasta numero de Amerika Esperantisto estas la plej bona ĝis nun.—Rev. B. C. MILLER.

### Internal Understanding

will solve many of the world's problems  
and promote the use of

## ESPERANTO

the Universal Language

Keep posted on your neighbors around the  
Pacific by reading the

## PACIFIC MAGAZINE

a monthly publication giving a digest of  
Pacific affairs. It has been adopted for  
use in many Universities and  
High Schools.

Annual Subscription .....	\$2.50	\$3.00
In combination with Am- erika Esperantisto .....	3.00	3.50
Saving .....	.50	.50

Send Check Today to  
PACIFIC MAGAZINE  
406 SOUTH MAIN STREET, ROOM 410  
LOS ANGELES, CAL.

## “Esperantistigu la Radio-Amatoron”

Nur malmultaj Esperantistoj scias ion pri la radio-amatoroj kiuj vivas inter ni, tie ĉi en Usono. Sed tia kondiĉo ne devas ekzisti ĉar radio estas ja la plej granda helpo en la mondo al Esperantistoj, laborante por la disvastigo de la bela lingvo.

Radio-amatoroj estas personoj kiuj tre interesiĝas en radio precipe en dissendiloj, lernas la “morse” kodon, konstruas sendilojn kaj ricevilojn kaj tiam super la mallongaj ondoj interparolas kun siaj radio-samideanoj en ĉiuj partoj de Usono kaj ofte kun fremduloj.

Multaj tiaspecaj amatoroj anstataŭ interrilatigante kun aliaj amatoroj pri siaj intereso, transsendas radiogramojn de persona intereso por siaj amikoj kaj ofte por nekonataj personoj—tute senpage.

En Usono estas preskaŭ 20,000 amatoroj. Esperanto estas preskaŭ nekonata inter ili. Kia granda kampo por laboro! jam ne eĉ komencita! Multaj inter tiuj ĉi ĝojiĝus se iu informus ilin pri Esperanto. Tamen preskaŭ neniu provis disvastigi Esperanton inter la amatoroj tie ĉi.

Kial vi ne konatiĝas kun unu amato tiam provante kun via tuta povo lin interesigi en Esperanto? Sendube estus facila interesigi multajn tiamaniere.

Kiam vi sukcesos interesigi amatoron pri Esperanto, informu lin ke oni organizas “Esperanto radio resendan sistemon” en Usono kun la celo resendi radiogramojn inter la Esperantistoj en Usono. Klarigu al li ke pliajn detalojn pri la asocio li povas obteni de Amatora Radio stacio W7AVE en Colville, Wash. aŭ W8CIL en Sherman, N. Y. (La menciitaj amatoroj estas la instigantoj de la Sistemo).

Kun la posedo de la ŝlosilo iu ajn amato povos lerni rapide kaj per plej efika metodo—la rekta metodo—ĉiutaga uzado!

DE LINDSAY WINKLER W7AVE.

### ALIGU SENPROKRASTE

Al la 10-a Jubilea Eldono de

### B-E-S-a ADRESARO

de Esperantistoj el ĉiuj landoj  
kiu

celas kolekti adresojn de ĉiuj E-istoj kaj de ĉiuj E-entreprenoj. Simpla aliĝo 0.50 Fsv. (10c aŭ 2 resp-kup.), aliĝo kun adresaro 1 Fsv. kun adresaro kaj portreto 1.50 Fsv. Anonca paĝo 25 Fsv. Detalan prospekton volonte al ĉiu sendas la eldonanto:

B E S (Bohema-E-Servo),  
Potštejn, Ĉeĥoslovakujo - Eŭropo

## Our Honor Roll

*Atesto pri Kapableco:*

Frederick Leslie Wharff, Paradise, Calif. (kun honoro).

Alois S. Knapp, Chicago, Ill.

*Atesto pri Instruado:*

George Winthrop Lee, Concord, Mass.

Mabel Butman, Allston, Mass.

Prof. William J. H. Knappe, Clinton, Iowa.

Prof. Louis C. Lambert, Boston, Mass.

Prof. Edwin L. Clarke, Winterpark, Fla.

Dr. B. K. Simonek, Chicago, Ill.

Jos. R. Scherer, Los Angeles, Calif.

EDWIN L. CLARK.

### Chapter No. 16

We are pleased to announce that the Esperanto Club of Long Beach, California, has applied for a charter as a Chapter of the Esperanto Association of North America. This lively new group will hereafter be known as

#### CHAPTER 16

*Esperanto Club of Long Beach*

A cordial welcome to the latest member of our organization family—the third group on the Pacific.

TUJ VI DEVAS MENDI  
PROVEKZEMPLERON  
DE

## LITERATURA MONDO

LA PLEJ BELA GAZETO  
EN ESPERANTO,

FOR 20 CENDOJ

Ĉefredaktoroj Kolomano Kalocsay  
kaj Julio Baghy

Kunlaborantoj la plej famaj esperantistaj  
verkistoj kaj tradukistoj.

Reprezentanto por Usono:

Amerika Esperanto Institute  
Sherlock Hotel, Madison, Wisconsin  
Usono

## Laborplena Jaro Por Ruĝa Kruco

La pasinta jaro, kiu finiĝis la 30-an de Junio, estis unu el la plej laborplenaj en la historio de la Amerika Ruĝa Kruco. Ĉiu servo kiu estis subtenata de la societo funkciis je plej granda rapideco. La fiska jaro de la Ruĝa Kruco komencis samtempe kun la sentebleco de la unuaj gravaj efikoj de la senpluveco de 1930-31. Dudek-du ŝtatoj, ampleksante pli ol 1,000 konteoj sentis la vipon de la katastrofo antaŭ ol la jaro estis duone pasinta. Dum la aŭtunaj monatoj de 1930 kaj dum la tuta vintro la postuloj por helpo de la Ruĝa Kruco kreskis. Je la klimakso de la urĝeco, Februaro 28an, pli ol 2,000,000 da homoj estis dependaj je la societo por nutraĵoj kaj vestaĵoj. Antaŭ la kompletigo de la help-programo tiu ĉi jare, la nombro da individuoj kiuj ricevis Ruĝ-Krucan helpon de unu formo aŭ alia estis atinginta 2,765,000. Malgraŭ la troaj bezonoj, aliaj servoj de Ruĝa Kruco daŭrigis paŝi antaŭen.

La indiko de la agosferoj de la Ruĝa Kruco montras la rapidecon per kiu la Ruĝa Kruco plenumis siajn nombrozajn devojn. La elfaritaĵoj de la jaro estas jene montrataj sub siaj respektivaj servofakoj laŭ la statistikoj kompilitaj de la Nacia Administracio:

Helpo ĉe Katastrofoj: 60 hejmaj ruiniĝoj prizorgitaj en 38 diversaj ŝtatoj, altigante la nombron da katastrofoj kiujn la societo prizorgis deponit sia fondiĝo al 1,100.

Milit-servo: Prizorgis 380,000 sociajn kaj financajn problemojn por eksmilitistoj kaj iliaj familioj kaj por viroj aliĝintaj la regulan Armeon kaj Militŝipistaron.

Urĝhelpo: Aljuĝis 73,000 'atestojn de Urĝhelpa kapableco dum la jaro, penante tiamaniere minimumigi la nombron da akcident-mortintoj, kiuj nun estas taksataj je 100,000 ĉiujare.

Vivsavado: Instruis vivsavadon laŭ tia vasta skalo ke 70,000 provitoj sukcesis je la ekzamenoj dum la jaro, tiamaniere malhelpante pliigon de la nombro da dronintoj, kiu nun sumiĝas je 1,000 ĉiujare.

Publika Flegado: Faris 1,340,000 vizitojn al pacientoj dum periodo de 12 monatoj, disvastigante la principon de saneco en hejmojn, lernejojn, kaj komunumojn tra la tuta lando.

Hejma Higieno: Laboro estis gvidata de 568 lokaj filioj de Ruĝa Kruco. Miloj da familioj estis instruitaj pri la prizorgado de malsanuloj.

Nutrado: Dum la jaro, 138,000 infanoj kaj plenkreskuloj estis instruitaj pri la plifortigo de la korpo per taŭgaj nutraĵoj.

Junulara Ruĝa Kruco: Varbis 7,000,000 da infanoj de lerneja aĝo en tiu ĉi lando, altigante la tutmondan anaron al pli ol 12,000,000, disvastigante feliĉecon kaj bonvolon ĉirkaŭ la globon.

Insulaj kaj Fremdlandaj Servoj: Etendis helpon ĉe 17 katastrofoj en insularaj kolonioj de Usono, kaj en fremdlandoj dum la jaro.

Volontula Servo: Varbis la plej grandan nombron da volontulaj laborantoj dum la lastaj pasintaj jaroj; la plej multaj el ili dediĉis siajn penojn al helpo inter viktimoj de senpluveco.

(Fremdlandaj gazetoj bonvolu represi.)

- The knowledge of Esperanto that we have gained through the printing of *Amerika Esperantisto*, coupled with our ever-present desire to make every printed piece look as fine as possible, makes us the logical source of supply for all Esperanto printing in America.

Let us quote on your office or publication requirements.

THE WOOD PRESS, Inc.  
Paterson, New Jersey

# UNIVERSITY OF MINNESOTA

OFFERS

## Esperanto by Correspondence Study

TAUGHT BY DR. LEHMAN WENDELL,

Member Examination Committee

of the

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, INC.

Two Courses    Beginning Esperanto    Fee \$10.00 each  
                  Advanced Esperanto

These courses are thorough and satisfying. Write for Catalog

CORRESPONDENCE STUDY DEPARTMENT

UNIVERSITY OF MINNESOTA

MINNEAPOLIS, MINN.

745 E. Willow St.  
Long Beach, Cal.

Hellie L. Nye

# SCIENCA GAZETO

## Esperanta

Nova popularsciencia gazeto kun la supra nomo estas eldonata tute en Esperanto kun sekvanta celo:

1. Utiligi Esperanton por disvastigi popularan sciencan en la tuta mondo.
2. Krei kampan kaj rimedon por utiligi Esperanton por praktikaj celoj, tiel nerekte propagandante Esperanton.
3. Kunligi ĉiujn esperantistojn kiuj interesiĝas pri sciencaj temoj.

La unua numero aperos ĉirkaŭ la 1-an de febr. 1932, kaj ni faros ĝin en la komenco dumonata kun la promeso ĉiumonatigi ĝin kiel eble plej baldaŭ, sen plialtigo de la abonprezo.

Jara abono unu dolaro usona.

Popularsciencaj artikoloj estas bonvenataj.

Sendu abonpagojn, artikolojn, kaj komunikaĵojn al

AMERIKA ESPERANTO - INSTITUTO

124 KING STREET

MADISON - WISCONSIN - U. S. A.

## Club Directory—Cont'd

*Chapter No. 14. Chicago Area Esperanto Society.* 2408 Warren Blvd., Chicago, Ill. Pres., Dr. George J. Drews; Sec'y, Alois S. Knapp; Treas., Arthur E. Regal. Meet every Wednesday at 8 p. m., at above address.

*Chapter 15. Detroit Esperanto Society.* 2916 E. Grand Blvd., Detroit, Mich. Pres., Dr. Tobias Sigel; Sec'y-Treas., Miss Elizabeth Stauffer.

*Arlington, Mass.* Arlington Esperanto Group. Meets every other Wednesday at 8:30 p. m. at 60 Oxford Street. Mrs. Esther T. Malouf, Sec'y.

*Baltimore, Md.* La Esperanta Rondeto. Hy S. Randall, Sek., 705 Winston Ave.

*Boston, Mass.* Boston Esperanto Informo. Miss E. J. Meriam, 50 Congress St.

*Charles City, Iowa.* Charles City Esperanto Club, Ellis Bldg. Dr. W. H. Seymour, Pres.; Mrs. Clarence Budensiek, Sec'y; Rev. Budensiek, Treas.

*Chicago, Ill.* La Gradata Esperanto Societo Nro. 1, 1500 W. Cullerton St., Chicago, Ill. Pres., Mr. J. B. Rezny; Sec'y, Mr. V. Popela; Treas., Dr. Leo G. Simonek. Meets fourth Friday of every month at 8 p. m.

*Chicago, Ill.* La Gradata Esperanto Societo N-ro 2a. Meets every second Wednesday at Maxwell's Vegetarian Restaurant, 35 E. Van Buren St. Sec'y, Mrs. Hannah Maxwell.

*Cleveland, O.* Cleveland Esperanto Society, 2735 Prospect Ave., Cleveland, O. Pres., James J. Fox; Sec'y and Treas., Mr. H. M. Duff. Meets first Thursday of the month at Public Library.

*Detroit, Mich.* Pola Esperanto Associo. Mr. B. Lendo, Sec'y, 3596 29th St.

*Duluth, Minn.* Duluth Esperanto Club. Pres., Mr. E. Bauer, Arlington Heights, Duluth; Sec'y, Mr. H. Merry.

*Jersey City, N. J.* Universal Esperanto Fraternity, Inc., 574 Jersey Avenue. President, John Bovit, 128 Market Street, Newark, N. J.; Secretary, Mrs. H. Tylick, 384 Baldwin Avenue, Jersey City, N. J. Business meetings on second Thursday of every month. Children's class meets Saturday evenings from 6 to 7:30, followed by tea, a club meeting and a social hour until 10. Warren Gould and Camille Katchko, instructors. Publishes quarterly "Esperanto-Lando."

*Lithopolis, O.* The Wagnalls Memorial Esperanto Society. Children's classes each Saturday afternoon. Adult classes each Tuesday evening.

*Milwaukee, Wis.* Bahai Auxiliary Esperanto Group. Meets every Tuesday, 8:00 to 10:00 p. m., at 1124 N. 12th St.

*New York City, N. Y.* Bahai Centre. Meets every second and fourth Saturday evenings at 119 W. 57th St.

*New York, N. Y.* SAT-Rondo Nov-Jorka. Kunvenas la-lastan vendredon de la monato ĉe 108 East 14th Street, je la 1a Sa horo. Antaŭsidanto, Ben Odinov; Protokol Sekretario, G. J. Kroes; Korespond-sekretariino, Herta Carstens; Kasistino, Bertha Israel; SAT-peranto, Ervin Dann; Bibliotekisto, Josef Lehn. Informon petu de Ben Odinov, 1930 73rd Street, Brooklyn, N. Y.

*New York, N. Y.* Grupo de Sennaciistoj, 24-29 Merchant St., Astoria, L. I., N. Y. Sekretario, T. Veder. Loka Branĉo de tutmonda organizo. Eldonas ĉiumonatan interesan bulleton "Ĉirkaŭ la Globo." Informojn petu ĉe supra adreso.

*Peoria, Ill.* Organizer, A. S. Mellichamp, 119 Butler St. Classes conducted by A. S. Mellichamp and Norman McQuown.

*Philadelphia, Pa.* Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

*San Francisco, Calif.* The Esperanto Ass'n of

California, 309-11 DeYoung Bldg., San Francisco, Calif. Sec'y, R. Hill. No regular meetings.

*St. Petersburg, Fla.* Sunbrila Rondo, 127 1st Ave., St. Petersburg, Fla. Pres., Roy S. Hanna. Meets at Princess Martha Hotel, Wednesday, at 3 p. m.

*Topeka, Kans.* Topeka Esperanto Association, 1122 W. 8th St., Topeka, Kans. Pres., Captain Geo. P. Morehouse; Sec'y and Treas., Mrs. Lida R. Hardy. Meets first Thursday of the month at 1122 W. 8th St. Two advanced and Beginners' classes.

*Toronto, Canada.* Toronto Esperanto Klubo, Peacock Inn, 99 Yonge St., Toronto. Pres., Elvin J. Bengough; Sec'y and Treas., Harry Wall. Meets 6:30 p. m. at Peacock Inn.

*Worcester, Mass.* Worcester County Esperanto Society. Meets at call of Council, at R. 17 P. O. Dr. Gustave Desy, Pres., Box 450, Millbury, Mass.; Odiorne Gleason, Sec'y and Treas., R. 17 P. O.

En grupaj festenoj

je gajaj vesperoj

je amaj esperoj

ĝis emociaj spirretenoj kapabligas vin la  
deklamo el

## STREĈITA KORDO

poemkolekto de K. Kalocsay

Prezo broŝ. sv. fr. 4.10

bind. " " 6.00

Aldonu 10 per cent. sendkostoj

Mendu ĉe la eldonejo:

L I T E R A T U R A M O N D O

Boraros ter 6. IV, 11

BUDAPEST IX

H U N G A R U J O

aŭ ĉe

Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko

Fort Lee, N. J.

UNU DOLARO = ALTA ĜUO!

Tiu komparo estas ĝusta, se vi aĉetas  
nian plaĉe ornamitan, ĉarman, bonkvalitan

HIMNO - DISKON

kun la Esperanto-Himno kaj bild-arjo el la  
opero "La Sorĉa Fluto." Preskaŭ 1,000  
diskoj vendiĝis dum mallonga tempo; La  
dua serio estos baldaŭ elvendita.

Prezo aŭfrankite \$1.00


ĉe

KOMERCISTA ESPERANTO-UNIO

Dresden-Radebeul,

Germanujo.

1881 Fifty years service  
to humanity



**JOIN!**  
**AMERICAN RED CROSS**